

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## EL NIA MUZEO

### Nia Muzeo prezentita en la 105-a AMO-Seminario

S-ro Doi Hirokaz prezentis nian muzeon per la reta konferenco, nome la 8-a Memorialo Lucija Borcic kaj la 105-a AMO-Seminario en la 13a de novembro (japana tempo). La Seminario mem estis de la 11a ĝis la 14a de novembro, kaj la ĉefa organizanto estis en Kroatio. La seminaria temo estis "Esperanto en (publikaj) bibliotekoj", kaj 20 personoj havis prezentadon.

Tie, s-ro Doi emfazis, ke nia instanco ja estas muzeo, por ke oni sciu tuton pri Esperanto, kaj biblioteko estas unu el la elementoj, kvankam tre gravaj. Li akcentis, ke la Muzeo estas malfermata al ĉiuj neesperantistoj.

Tiu prezentado realiĝis dank' al la rekomendo de s-ino Mireille Grosjean el Svislando, vizitinta la Muzeon en oktobro, kun 2 aliaj svisaj esperantistinoj, survoje al la 110a Japana Esperanto-Kongreso en Kawasaki.

### Niaj klasoj

\***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, en la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Oni eklegis en junio nefikciaĵon "Homoj manĝantaj" de Hemmi Yo, tradukitan de Doi Ĉieko.

\***Eseoj**: gvidas Doi Hirokaz, en la Muzeo, en sabato de 14:30-16:30. Oni legis nefikciaĵon "Homoj manĝantaj" ĝis julio. De septembro legas "Quo Vadis" (ties 2a ĉapitro en novembro).

\***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton oni legas "Paradizo Ŝtelita" de Trevor

Steele. La 2-an sabaton oni kune legas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni kune legas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

\***Teksantoj**: gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo. En julio finlegita estis "Falantaj Muroj" de Trevor Steele. Nun legata estas "Kredu min, Sinjorino!" de Cezaro Rossetti.

\***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, en la Muzeo. Legata estas "Viktimoj" de Julio Baghy.

\***Elementa kurso**: Gvidas Doi Ĉieko en la Muzeo.

### Aŭstralia Radio 3ZZZ legis niajn artikolojn

(junio-novembro 2023)

elsendo de la 18a de septembro 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 386 "Memoro de esperanto kurso en 1960" de Itabaŝi Micuko

elsendo de la 13a de novembro 2023

el Novaĵoj Tamtamas numero 390 "Facile kompreneblaj esprimoj" de Akiya Hideo

## eseoj

## Japanana ordinara manĝaĵo “*Nattou*”

Itabaŝi Micuko

*Nattou* estas sojfabofermentaĵo. Ĝi enhavas multe da proteino kaj vegetalaj fibroj. Tial oni diras, ke ĝi estas saniga nutraĵo.

Eroj de *Nattou* kungluiĝas pro sia enzimo (fermento). Mi ne scias ties esperantan nomon, sed en nia lingvo oni nomas la enzimon *Nattokinaze*. *Nattokinaze* bone laboras en nia korpo. En nia dika intesto vivas multe da bakterioj. Kelkaj el ili malbone efikas kontraŭ nia sano. *Nattokinaze* batalas kontraŭ tiuj bakterioj, kaj ankaŭ ĝenas koaguliĝadon de sango. Tiu efiko estas tre bona por ordinaraĵoj, sed post kirurgia operacio oni devas ne manĝi *Nattou*-n pro tiu efiko de *Nattokinaze*. Plie *Nattou* havas vitaminon K-on. La vitamino K helpas fari oston. Tial oni diras, ke ĝi estas bona nutraĵo por teni Junecon.

Mi ŝatas *Nattou*-n kaj preskaŭ ĉiutage manĝas. Mia forpasinta fratino kaj mia amikino Maria el Hispanio ne nur ŝate manĝis, sed ili mem faris ĝin.

Lastatempe mi komencis fari *Nattou*-n. Kiam mi estis infano, oni faris ĝin el rostita kaj pecigita sojfabo. Mia fratino faris sammaniere kaj diris, ke tiel farita *Nattou* estas aŭtentika. Nuntempe mi ne trovis tiun *Nattou*-n en vendejo. Mi serĉis farmetodon en interreto, sed ne trovis. Mi pensis, ke mi prove faru tiun *Nattou*-n, kaj estos bone, eĉ se mi fiaskos!

Nu, mi skribos kiel mi faris tiun *Nattou*-n.




Mi aranĝis kvincent gramojn da purigitaj sojfaboj, kaj rostis ilin per pato (foto1). Pato el fero estas pli bona ol el nova materialo. Mi enmetis rostitajn sojfabojn en akvon, kaj lasis ilin en la akvo (foto2). Da akvo estas pli-malpli litro. Post inter dek kaj dudek horoj rostitaj sojfaboj sorbis akvon kaj fariĝis molaj. Mi disfrakasis ilin kaj boligis la frakasitajn por kelke da minutoj. (La boligitaj sojfaboj estas tro varmegaj por fermenti.)

Mi transmetis ĝin en argilaĵon, atendis, ĝis ĝia temperaturo malvarmiĝis je kvindek celsiaj gradoj, kaj en ĝin miksis kvindek gramojn da *Nattou*, kiun mi aĉetis en vendejo (foto3,4). Poste mi kovris tiun ujon per kovrilo. Por fermenti, sojfaboj bezonas oksigenon. Tial mi rekomendas al vi tukon kiel kovrilon. Tamen kiam vi uzos plastan filmon, faru kelke da truoj sur ĝi. Plie mi kovris la ujon kun sojfabo per bantuko por teni varmon.

En malvarma tempo mi kovris tion per lantuko

kaj fojfoje esploris ties temperaturon por eviti malvarmiĝon. Kiam la temperaturo malaltiĝis, mi varmigis la ujon per elektroforno ĝis kvindek gradoj. Tempo de la fermentado estas pli-malpli tridek horoj en somero.

La farmetodo estis tre simpla. Kaj tiel faritaj *Nattou* estis tre bongstaj! Vi provu, kiam vi havos tempon.



mia eta elektrofrakasililo

# Internacia Romantika Trompo

Mizro Iwaya

Lastatempe mi aŭdis pri tia trompistino nomata “ricevema junulino (頂き女子).” Simila delikto estas vaste konata “internacia romantika trompo”. Japanoj ofte estas ĝiaj “klientoj” sed fakte usonanoj estas pli oftaj klientoj de tiu delikto. Lastatempe mi legis en iu libro ke ĝiaj krimantoj vaste troviĝas en okcidenta Afriko. La aŭtoro de la libro flugis al Niĝerio kaj detale esploris la situacion ĉirkaŭ tio.

Lia plej granda surprizo estis ke la laboro de la romantika trompo estas populara kromlaboro en niĝeriaj universitatoj. Kiel supozate, la ekonomia stato de la lando estas relative mizera. Studentoj havas ekonomian obstaklojn por daŭrigi sian studon. Do ili devas kromlabori por subteni sian vivadon. La plej efika laboro estas trompi eksterlandanojn, precipe usonanojn, kaj gajni monon, ĉar ili havas supersufiĉe. Oni diras ke ĉirkaŭ duono de niĝeriaj studentoj okupas sin pri tiu metio.

Antaŭ ĉio mi volas malnete skizi la skeleton de tia delikto. Iu, ekzemple japana soleca mezaĝulo, ricevas mesaĝon kiu diras “Mi estas ravita de via profilo montrita en via XXX” kun la foto de bela junulino. Ili komencas korespondadon kaj enamiĝas. Ŝi diras ke ŝi tre deziras vidi lin, sed mankas mono por aĉeti flugbileton. Do la soleca viro sendas konforman monkvanton, ĉirkaŭ 200

mil enoj (\$1500), kaj la kontakto estos definitive nuligita.

Kompreneble ekzistas senlima varieco en tiu maniero. Supre montrita estas nura ekzemplo de la bunta ĝardeno. Oni devas rimarki ke tia “laboro” estas pli facila por studentoj ol la laboro, ekzemple, en oportuna vendejo, ĉar:

- \* Ekzistas multaj samprofesiuloj en la universitato, kiuj donas utilan konsilon,
- \* Ekzistas eĉ instrukciaj broŝuroj por tiu celo,
- \* Troviĝas multaj ekzemplaj frazaroj kaj ekzercaroj en la angla lingvo, aŭ en aliaj lingvoj, kiujn oni povas simple kopii kaj glui,
- \* Ankaŭ fotoj troviĝas abunde en interreto, eĉ movbildoj, kiujn oni povas kopii,
- \* Se trovita kaj persekutata, ili povas refuti, “Tiu ĉi estas nia venĝo kontraŭ viaj flagoj antaŭ 200 jaroj.”

La ago estas kontraŭleĝa sed la puno estas malpeza, kaj oni povas eĉ eskapi el tiu puno per korupta mono en Niĝerio. Oni povas trovi eĉ “heroon” en interreto kiu gajnis pli ol 100 milionojn da enoj en tiu profesio kaj aĉetis Benz, kun kiu aŭto li montras sian vivon rete. Aliaj admiras lian sukceson kaj fervore sekvas lin. Ja abomeninda mondo de mistifiko (ankaŭ en Japanio)!

## sezonvorto decembra

### Baniĝo kun juzuo

Okita Kazumi

Oni nomas la tagon en kiu la nokto estas la plej longa en la jaro “vintra solstico” (ĉi-jare la 22a de decembro). En tiu tago oni kutimas baniĝi en banujo, kun flosantaj juzuoj (aromŝelaj oranĝoj), esperante, ke la tuta familio restos tute sana.

Oni diras, ke tiu frukto utilas por aktivigi sangocirkuladon kaj preventi malvarmumon.



juzuo (*Citrus junos*) →

## La poŝtaj abonantoj de “Novaĵoj Tamtamas” por decembro 2023

Jenaj abonantoj ricevas poŝte nian gazeton.

Tiu ĉi gazeto de Esperanto Jokohama estas legebla rete:

<https://www.esperanto.yokohama/novajhoj-tamtamas/>

tial se vi bonvolas ricevi la gazeton nur rete,  
ni dankas vin pro la redukto de poŝta tarifo.

Kontaktu nin je: [tamtamo@eo-jokohama.bona.jp](mailto:tamtamo@eo-jokohama.bona.jp) !

***Kontribuu al ni pri vi, viaj vivo, grupo, kulturo ktp!***

<b>lando</b>	<b>nomo</b>
Aŭstralio	s-ino Franciska Toubale
Belgio	Internacia Esperanto-Arkivo
Belgio	Monato, Flandra Esperanto-Ligo
Ĉeĥio	s-ino Libuše Dvořáková (por Esperanto-Muzeo)
Ĉinio	Ĉina Esperanto-Ligo
Ĉinio	El Popola Ĉinio
Ĉinio	Esperanto-Sekcio de Ĉina Radio Internacia
Ĉinio	Ĉina Esperanto-Muzeo
DR Kongo	Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio
Eŭskio/Hispanio	s-ro Aitor Arana
Francio	Centro Esperanto de la Regiono Liona
Francio	Nacia Esperanto-Muzeo
Germanio	Germana Esperanto-Asocio
Germanio	ges-roj Dieter kaj Yoshie Kleemann
Germanio	S-ro Peter Zilvar
Hungario	Juna Amiko
Indonezio	Indonezia Esperanto-Asocio
Irano	S-ro Ahmad Reza MAMDUHI
Italio	S-ro Glauco Pompilio
Korea Resp.	Korea Esperanto-Asocio
Korea Resp.	s-ro Jang Jeong Ryeol
Malajzio	Malajzia Esperanto-Asocio
Meksikio	Meksika Esperanto-Federacio
Mongolio	Mongola Esperanto-Societo
Nederlando	Internacia Esperanto-Instituto
Nederlando	Universala Esperanto-Asocio
Nepalo	Nepala Esperanto-Asocio
Nepalo	S-ro Bharat Kumar Ghimire
Nepalo	S-ro Razen Manandhar
Srilanko	Srilanka Esperanto-Asocio
Tajvano	薛瑞察 /Reza Kheir-Khah
Tanzanio	S-ro Minani Semutwa Matabaro
Uganda	s-ro Joel Muhire
Vjetnamio	s-ino Nguyen Thi Phuong Mai
Vjetnamio	Vjetnama Esperanto-Asocio